IpI

Informilo *por* Interlingvistoj

Volumo 33 (kvara serio), numero 1-4 (126-129), 2024
ISSN 1385-2191

Eldonas

Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED)
interlingvistiko.net ♦ @CED_interling

Redaktas

Başak Aray ♦ Kimura Gorō Christoph (木村 護郎クリストフ)
Jorge Antonio Leoni de León ♦ Bengt-Arne Wickström

Por kontakti la redakcion: IpI@interlingvistiko.net

ENHAVO

Kajero 33:1 (126) **8**

I Eventoj **9**

1 International Congress of Linguists, 2024-09-8/14 **9**

2 Internacia simpozio pri la konstruitaj lingvoj (I-CONlangs II), 2024-07-4/5 **9**
2.1 Organizantoj . . . 9
2.1.1 Loko . . . 9
2.2 Temo . . . 9
2.3 Priskribo . . . 9

3 9-a Nitobe-simpozio, 2023-07-28/29 **10**

II Universitata kaj esplora agado **11**

1 Sukcesplena Erasmus+-projekto por lingvolernado finiĝis **11**

2 Kontrakto pri kunlaboro inter Universitato Vytautas la Granda kaj la Litova Esperanto-Asocio **11**

III Kulturo **12**

1 La Esperanto-kolekto ĉe la Nacia Biblioteko de Pollando **12**
1.1 Serĉi en la katalogo . . . 12
1.2 La defio de Biblioteko Hector Hodler . . . 13

2 Deklaro de la Centro por Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) okaze de la 75-a datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj **14**

3 Artikolo de Michele Gazzola en *The Guardian* **15**

IV Personoj **16**

1 Erich-Dieter Krause (1935 – 2023) **16**

2 Lisa McEntee-Atalianis iĝis plenrajta profesoro **16**

V Bibliografiaĵoj 17

1 Disertacioj kaj diplomlaboraĵoj **17**

2 Fakrevuaj artikoloj **17**

3 Libroj **17**

4 Libroĉapitroj **18**

5 Revu-numeroj **18**
5.1 Jahrbuch der Gesellschaft für Interlinguistik . . . 18
5.1.1 Enhavo . . . 18
5.2 Language Problems and Language Planning . . . 21
5.2.1 Enhavo . . . 21
5.3 Beletra Almanako . . . 23
5.3.1 Enhavo . . . 23

6 Novaĵleteroj **24**
6.1 Global coalition for language rights (GCLR) . . . 24

Kajero 33:2 (127) 25

I Eventoj 26

1 International Symposium on Language Ideologies and Attitudes (IDEOLING), 2024-10-18/19 **26**
1.1 Loko . . . 26
1.2 Temo . . . 26
1.3 Priskribo . . . 26

2 46-a Esperantologia konferenco dum UK en Aruŝo **26**
2.1 Organizantoj . . . 26
2.2 Loko . . . 26
2.3 Temo . . . 26
2.4 Priskribo . . . 26

3 Fifth biannual REAL symposium: Human capital, languages, and new literacies; Theories, policies, and impacts, 2024-06-03/04 **27**
3.1 Organizantoj . . . 27
3.2 Loko . . . 27
3.3 Temo . . . 27

3.4 Priskribo 27

4 Colloque international sur les langues construites, I-Conlang, 2024-07-04/05 28
4.1 Organizantoj 28
4.2 Loko 28
4.3 Temo 28
4.4 Priskribo 28

II Universitata kaj esplora agado 29

1 Kurso «Enkonduko al interlingvistiko» 29

III Kulturo 30

1 Du artikoloj pri la interlingvo Bālaïbalan 30

2 Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko: Gazeteltondaĵoj 1898–1915: la kolekto Hachette en la interreto 30

3 *Le Monde* publikigas artikolon pri konstruitaj lingvoj, 2024-01-26 31

4 Televida kanalo Arte publikigis videaĵon pri volapük kaj esperanto 31

5 Nova ampleksa artikolo pri «Lingva justeco» en Vikipedio 32

6 Laborrenkontiĝo pri dulingva gepatra infanformigo, Caroline Marshall Draughon Center for the Arts & Humanities, Auburn, Alabamio, 2024-11-06 32

IV Personoj 33

1 Wim Jansen, 1948 – 2024 33

2 Kariera salto de Başak Aray 34

3 Sabine Fiedler emeritiĝis 2023-11 34
3.1 Biografio 34
3.2 Bibliografio 35
3.2.1 Libroj 35
3.2.2 Fakrevuaj artikoloj 36
3.2.2.1 1981 – 1990 36
3.2.2.2 1991 – 2000 36
3.2.2.3 2001 – 2010 37
3.2.2.4 2011 – 2020 37
3.2.2.5 2021 – 39

3.2.3 Libroĉapitroj . . . 39
3.2.3.1 1981 – 1990 . . . 39
3.2.3.2 1991 – 2000 . . . 40
3.2.3.3 2001 – 2010 . . . 41
3.2.3.4 2011 – 2020 . . . 44
3.2.3.5 2021 – . . . 46
3.2.4 Redaktaĵoj . . . 47
3.2.4.1 1995 – 2010 . . . 47
3.2.4.2 2011 – 2020 . . . 47
3.2.4.3 2021 – . . . 49

V Bibliografiaĵoj 51

1 Disertacioj kaj diplomlaboraĵoj 51

2 Fakrevuaj artikoloj 51

3 Libroj 52

4 Libroĉapitroj 53

5 Revu-numeroj 53
5.1 Language Problems and Language Planning . . . 53
5.1.1 Language Problems and Language Planning, **47:2**, 2023. ISSN: 0272-2690. E-ISSN: 1569-9889. . . . 53
5.1.1.1 Enhavo . . . 53
5.1.2 Language Problems and Language Planning, **47:3**, 2023. ISSN: 0272-2690. E-ISSN: 1569-9889. . . . 55
5.1.2.1 Enhavo . . . 55
5.2 Beletra Almanako . . . 57
5.2.1 *Beletra Almanako*, **48**, oktobro 2023. ISBN: 9781595694560. ISSN: 1937-3325. . . . 57
5.2.1.1 Enhavo . . . 57

6 Novaĵleteroj 58

Kajero 33:3 (128) 59

I Eventoj 60

1 46-a Esperantologia konferenco, 2024-08-08 60
1.1 Organizantoj . . . 60
1.2 Loko . . . 60
1.3 Programo . . . 60

2 Colloque international sur les langues construites (Internacia konferenco pri konstruitaj lingvoj), 2024-07-04/05 **62**
2.1 Organizantoj . . . 62
2.2 Loko . . . 62
2.3 Programo . . . 62
2.4 Ekspozicioj . . . 65

3 Konferenco pri aplikoj de esperanto en scienco kaj tekniko (KAEST), 2024-11-7/10 **65**
3.1 Organizantoj . . . 65
3.2 Loko . . . 65
3.3 Programo . . . 65
3.4 Priskribo . . . 66

II Universitata kaj esplora agado **67**

1 Prelego de Walter Klag pri Esperanto en la Universität Wien, 2024-05-29 **67**

2 Esperantokurso en Волинський національний університет імені Лесі Українки (Volinia nacia Lesja-Ukrainka-universitato) de Lucjk **67**

3 Prelego pri la esperanto-movado en Japanio ĉe L'École des hautes études en sciences sociales (ÉHÉSS), Parizo **67**

4 Materialoj de zooma kurso pri interlingvistiko, Université Espoir du Congo (Chuo Kikuu cha Kongo) **68**

III Kulturo **69**

IV Personoj **69**

1 Umberto Eco – La quête d'une langue parfaite dans l'histoire de la culture européenne (1992) **69**

V Bibliografiaĵoj **70**

1 Disertacioj kaj diplomlaboraĵoj **70**

2 Fakrevuaj artikoloj **73**

3 Libroj **74**

4 Librocâpitroj **75**

5 Revu-numeroj **75**
5.1 Beletra Almanako . . . 75
5.1.1 *Beletra Almanako*, **49**, febraro 2024. ISBN: 9781595694560. ISSN: 1937-3325. . . . 75
5.1.1.1 Enhavo . . . 75
5.2 Esperantologio / Esperanto Studies . . . 76
5.2.1 *Esperantologio / Esperanto Studies*, **Nova Serio 5 (13)**, 2024. ISBN 9781595694515. ISSN 1311-3496. . . . 76
5.2.1.1 Enhavo . . . 76
5.3 Investigationes Linguisticae . . . 77
5.3.1 *Investigationes Linguisticae*, **47**, 2023. . . . 77
5.3.1.1 Enhavo . . . 77
5.3.2 *Investigationes Linguisticae*, **48**, 2024.. Numer specjalny: ROSYJSKOŚĆ: tęsknota za tożsamością. Zbiór tekstów konferencyjnych . . . 78
5.3.2.1 Enhavo . . . 78

Kajero 33:4 (129) **79**

I Eventoj **80**

1 La 21-a Internacia Kongreso de Lingvistoj (ICL), Laborgrupo interlingvistiko, 2024-09-8/14 **80**
1.1 Organizantoj . . . 80
1.2 Loko . . . 80
1.3 Programo . . . 80
1.4 Raporto . . . 81

2 46-a Esperantologia konferenco dum la 109-a Universala Kongreso de Esperanto en Aruŝo, 2024-08-08 **83**

3 La 2-a simpozio pri konstruitaj lingvoj, 2024-07-04/05 **83**

4 Konferenco: Esperanto en Asio, 2024-08-30/31 **84**
4.1 Loko . . . 84
4.2 Programo . . . 84

II Universitata kaj esplora agado **86**

1 La Interlingvistikaj studoj en AMU finis sian agadon per la lastaj ekzamenoj **86**

III Kulturo **88**

1 Centro de Dokumentado pri Esperanto en Subirats, Katalunio **88**

2 Esperanto en gazeteltondaĵoj **88**
2.1 Enkonduko . . . 88
2.2 La Kolekto Hachette . . . 89
2.3 Esplordemandoj . . . 89
2.4 Superrigardo pri la dukto . . . 89
2.5 Rezultoj: ONB-katalogeroj, plenteksta serĉado kaj IIIF-datumaro . . . 91
2.6 Ligiloj, financiga informo kaj komunumo . . . 91

IV Personoj **92**

V Bibliografiaĵoj **92**

1 Disertacioj kaj diplomlaboraĵoj **92**

2 Fakrevuaj artikoloj **92**

3 Libroj **92**

4 Libroĉapitroj **92**

5 Revu-numeroj **93**
5.1 Jahrbuch der Gesellschaft für Interlinguistik . . . 93
5.1.1 Jahrbuch der Gesellschaft für Interlinguistik, 2024. ISBN: 978-3-96023-577-4. . . . 93
5.1.1.1 Enhavo . . . 93
5.2 Language Problems and Language Planning . . . 94
5.2.1 Language Problems and Language Planning, **48:1**, 2024. ISSN: 0272-2690. E-ISSN: 1569-9889. . . . 94
5.2.1.1 Enhavo . . . 94
5.3 Beletra Almanako . . . 96
5.4 Esperantologio / Esperanto Studies . . . 96
5.5 Investigationes Linguisticae . . . 96

6 Novaĵleteroj **96**

Kajero 33:1 (126)

I EVENTOJ

1 International Congress of Linguists, 2024-09-8/14

La *International Congress of Linguists* organizata de *Comité International Permanent des Linguistes* (CIPL), okazanta ĉiun 5-an jaron, ĉi-jare kunvenos en Poznano ĉe la Adam-Mickiewicz-Universitato. Kadre de ĝi oni okazigos laborsekcion pri interlingvistiko.

Pliaj informoj ĉi tie

2 Internacia simpozio pri la konstruitaj lingvoj (I-CONlangs II), 2024-07-4/5

2.1 *Organizantoj*

Guillaume Enguehard (Université d'Orléans), Philippe Planchon (Université de Tours) kaj Alice Ray (Université d'Orléans)

2.1.1 Loko

Orléans (Francio)

2.2 *Temo*

Konstruitaj lingvoj: internaciaj help-lingvoj, precipe Esperanto; fikciaj lingvoj (en literaturo, kinarto, videoludoj, ktp.) kaj lingvoj kun pedagogiaj, logikaj aŭ eksperimentaj celoj

2.3 *Priskribo*

La Internacia Simpozio pri la Konstruitaj Lingvoj (I-CONlangs II) estas la dua eldono de evento (unuafoje okazinta en Torino en 2022) kiu celas proponi forumon dediĉitan al plurdisciplina esploro de la konstruitaj lingvoj.

La kreado de konstruita lingvo povas havi diversajn celojn, sed ilia studo aperigas komunan serion da demandoj, kiujn I-CONLANG II 2024 intencas pritrakti. Jen listo de kelkaj ekzemploj el tiaj esplorindaj demandoj:

- la diversaj celoj de la konstruitaj lingvoj kaj la rimedoj uzitaj por atingi ilin
- lingvaj rimedoj uzitaj en la kadro de konstruitaj lingvoj
- la specifaj malhelpoj kiuj aperas dum la kreado kaj/aŭ uzado de konstruita lingvo
- la sociaj kaj kulturaj efikoj kaj konsekvencoj de la konstruitaj lingvoj

- la disvolviĝo de lingvoprojektoj kaj ties rezultoj (simbolaj, psikologiaj, sociologiaj, kaj historiaj)
- la defioj kaj limigoj de tiaj lingvoj
- la diferencoj aŭ similecoj observitaj inter la konstruitaj lingvoj kaj la naturaj lingvoj

Por plej bone speguli la diversecon de la konstruitaj lingvoj, la simpozio estos organizata tra tri preleg-sesioj (laŭ la triangulo de Gnoli):

1. sesio pri help-lingvoj, precipe pri Esperanto
2. sesio pri fikciaj lingvoj (en literaturo, kinarto, videoludoj, ktp.)
3. sesio pri konstruitaj lingvoj kun pedagogiaj, logikaj aŭ eksperimentaj celoj

Ankaŭ estos organizata aldona afiŝ-sesio por prezenti la kreadon de novaj konstruitaj lingvoj, kaj ni invitas ĉiujn lingvo-konstruistojn fari ĉi-rilate proponojn, sen konsideri ĉu ili estas studentoj, instruistoj, esploristoj, aŭ personoj laborantaj ekster la akademia medio.

Pliaj informoj ĉi tie

3 9-A NITOBE-SIMPOZIO, 2023-07-28/29

Intertempe aperis jutuba video, kiu dokumentas la simpozion.

Vidu ankaŭ *IpI* 123-124, I.1 kaj III.2 de tiu ĉi kajero.

II UNIVERSITATA KAJ ESPLORA AGADO

1 Sukcesplena Erasmus+-projekto por lingvolernado finiĝis

Finiĝis la projekto *TestU Online – free portal of tests for education*, financita de la Eŭropa Komisiono dum la jaroj 2021 ĝis 2023. Ĝi plenumis sian taskon krei senpagan, multlingvan retan platformon kun ekzercoj kaj testoj por la lernando de fremdlingvoj. La laboro estis gvidata kaj kunordigita de la registara junulara organizo Edukado ĉe Interreto (E@I) el Slovakio. Aliaj kunlaborintaj partneroj estis *bit Schulungszentrum* en Aŭstrio, Adam-Mickiewicz-Universitato Poznano en Pollando, Universitato Vilno en Litovio kaj Universitato Leipzig en Germanio. Enhavante tre multajn lingvojn (kaj inter tiuj eĉ «malgrandajn» kiel la malsuprasoraban, la kimran kaj Esperanton), tiu projekto vere plenumas la celojn de la Eŭropa Komisiono pri subtenado de multlingveco. La platformo ne nur ofertas grandan nombron da pretaj ekzercoj kaj testoj por praktiki la leksikon, gramatikon, aŭdan kaj legan komprenadon en la koncernaj lingvoj helpe de tekstoj, bildoj kaj videoj, sed krome kapabligas lingvoinstruantojn sen teknikaj antaŭscioj mem krei enhavojn laŭ siaj deziroj.

2 Kontrakto pri kunlaboro inter Universitato Vytautas la Granda kaj la Litova Esperanto-Asocio

La rektoro de la universitato, prof. Juozas Augutis, kaj la prezidanto de LEA, Povilas Jegorovas, subskribis la kontrakton la 6-an de decembro 2023 en Kaŭno.

Source: *La ondo de esperanto*, more information found here in Esperanto).

III KULTURO

1 LA ESPERANTO-KOLEKTO ĈE LA NACIA BIBLIOTEKO DE POLLANDO

Grava momento por la plukonservado de la Esperanto-heredaĵo estis la ĉi-jara transdono de la Biblioteko Hector Hodler al la Nacia Biblioteko de Pollando. La solenaĵo okazis la 29-an de majo 2023 en la ĉeesto de la prezidanto de Universala Esperanto-Asocio doktoro Duncan Charters, la direktoro de la Nacia Biblioteko doktoro Tomasz Makowski kaj la tiama pola kulturministro profesoro Piotr Gliński (vidu la raporton en IpI 123-124, p. 18-21). Dank'al interkonsento inter la Nacia Biblioteko kaj Universala Esperanto-Asocio (UEA), proksimume sep kaj duona tunoj da libroj kaj unikaj materialoj estis transportitaj de la biblioteko kaj arĥivo de UEA el Roterdamo al Varsovio.

1.1 *Serĉi en la katalogo*

Tio tamen ne signifas inaŭguron de la Esperanto-kolekto en Varsovio. Jam antaŭ la transdono, la pola ĉefurbo fieris pri iu el la plej interesaj Esperanto kolektoj, kiuj dokumentas la komencon kaj evoluigon de la Lingvo internacia kaj de la Movado. La dokumentoj en tiu jama kolekto estas serĉeblaj pere de la katalogo de la pola Nacia Biblioteko, kiu estas konsultebla en kelkaj lingvoj. Vidu Ilustraĵo 1.1. Nur valoras noti, ke por ŝerĉi la dokumentojn necesas uzi ĉapelitajn



ILUSTRAĴO 1.1 Ekzemplo el PNB-katalogo

ILUSTRAĴO 1.2 Ekzemplo de PNB-kolektaĵoj

literojn, ĉar bedaŭrinde dume la uzo de iksoj ne funkcias bone.

Notindas ankaŭ la fakto, ke la malgranda parto de la jam posedita kolekto estis jam ciferecigita kaj konsultebla kaj elŝutebla rete, ĉe la paĝaro *Polona*, parto de la Nacia Biblioteko; vidu Ilustraĵo 1.2:

1.2 *La defio de Biblioteko Hector Hodler*

Preskaŭ samtempe kun la solena transdono de la trezora UEA-kolekto al Varsovio komenciĝis ĝia katalogado. Tio estas grandega defio, ĉar ni parolas pri enorma kolekto neniam pli frue katalogita aŭ detale prilaborita. Do ĉion oni devas fari dekomence laŭ la normoj de la Nacia Biblioteko, aldonante al la katalogo ne nur informojn facile atingeblajn (ekz. la loko kaj jaro de la eldono de difinita libro), sed ankaŭ pli komplikajn aferojn, kiel la jaro de la unua eldono en la lingvo de la originalo (se temas pri traduko) kaj ties titolo. Vidu Ilustraĵo 1.3.

Se ni parolas pri la nuntempe eldonataj libroj, ĉi-specaj informoj estas facile atingeblaj en la reto. Tute alimaniere la situacio aspektas, kiam oni devas katalogi librojn eldonitajn baldaŭ post la naskiĝo de Esperanto. Ofte temas pri libroj eldonitaj kaj rekonitaj nur en iu malgranda regiono, aperintaj en tre malgranda eldonkvanto. Do, la plena katalogado estas granda defio, sed ĝi paŝo post paŝo progresas. Unuaj partoj de la Biblioteko jam estas konsulteblaj en la katalogo. Ekzemple, tien jam trafis i.a. armena eldono de la *Fundamento de Esperanto* (1911), kaj eĉ pli frua *El la vivo de esperantistoj*, kiu estis presita en la jaro 1896. Sed evidente ne mankas ankaŭ novaĵoj, kiel ekzemple tria eldono de *Sed nur fragmento* de Trevor Steele (2020), aŭ bele ilustrita libro por infanoj *Novulo en la urbo* (2021).

Iom simile al la heroo de la laste menciita libro, mi estas novulo en la biblioteka fako. Komencante mian laboron en la Nacia Biblioteko, mi lernis utiligi mian multjaran sperton pri interreta serĉado kaj publikigado de tekstoj kun abunda uzo de retaj fontoj. Tio ebligis al mi relative rapide kompreni almenaŭ tiun aspekton de la librokatalogado. Sed multon alian mi devis lerni dekomence kaj ankorau lernadas. Aldonante al la katalogo iun kontretan eron, necesas ne nur

Szczegóły

Tytuł	Aŭtobiografio de bakterio / Gaŭ Ŝiĉji.
Twórca	Gao, Shiqi (1905-1988) Autor ›
Inny tytuł	Tytuł oryginału: Jun'er zizhuan, 1936. Tytuł oryginału: 菌儿自传, 1936.
Opis fizyczny	[6], 108, [2] strony : fotografie ; 19 cm.
Wydanie	Unua eldono.
Wydawca	Pekino : Cina Esperanto-Eldonejo
Data publikacji	1986
Forma i typ	Książki Proza
Odbiorca	Grupa wiekowa 9-13 lat
Przynależność kulturowa	Literatura chińska
Temat	Badania naukowe › Bakterie › Ciało ludzkie › Higiena ›
Gatunek	Powieść
Język	esperanto

ILUSTRAĴO 1.3 Ekzemplo de PNB-katalogero

detale ĝin priskribi konforme al la koncernaj normoj. Necasas ankaŭ klasifi ĝin, grupigante ĝin sub specifa literatura tipo, kun eldonaĵoj en aŭ el la koncerna lingvo, reliefigante ĝian aliron al la prilaborata temo, ktp. Tiamaniere ĉiu unuopa libro ne signifas aldonon nur de unu slipo al la biblioteka kolekto, sed ankaŭ vastigas la variecon de libroj trakantaj iun temon, la reprezenton de specifa lingvo aŭ regiono, kaj simile. Tio por mi estas la plej fascina aventuro: Lerni pere de la katalogataj libroj pri la mondo kaj homoj kaj laŭeble plej bone disponigi tiun scion al aliaj, igante la libron bone prilaborita kaj facile serĉebla.

Gabriela Skonieczna

2 DEKLARO DE LA CENTRO POR ESPLORO KAJ DOKUMENTADO PRI MONDAJ LINGVAJ PROBLEMOJ (CED) OKAZE DE LA 75-A DATREVENO DE LA UNIVERSALA DEKLARACIO DE HOMAJ RAJTOJ

Okaze de la 75-a datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj de la 10-a de decembro 1948, la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) emfazas la historian gravecon de tiu ĉi deklaro kaj atentigas pri la fundamenta rolo de lingvo en la difino, protektado kaj antaŭeniĝo de la universalaj homaj rajtoj.

La Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj eksplicite malpermesas diskriminacion bazitan sur lingvo koncerne ĉiujn rajtojn listigitajn en la Deklaracio. Ĉi tiuj inkluzivas egalan protekton sub la leĝo; preventado de arbitra enmiksiĝo kun privateco, familio, hejmo aŭ korespondado; libereco de esprimo (inkluzive de la rajto serĉi, ricevi kaj transdoni informojn kaj ideojn per iu ajn komunika rimedo kaj sen konsidero al landlimoj); egala aliro al publikaj servoj en la propra lando; kaj la ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj rajtoj esencaj por persona digno kaj libera personeca evoluo. Aldone, la Deklaracio agnoskas la prioritaton de gepatroj en elektado de la speco de edukado provizita al iliaj infanoj. Tamen restas tiel, ke lingvo tre ofte estas la bazo por neegala rekono kaj protekto de homaj rajtoj de individuoj. Parolantoj de minoritataj lingvoj multe pli verŝajne spertas neadon aŭ limigon de tiuj rajtoj surbaze de lingvo.

Dum la Deklaracio restas mejloŝtono en la evoluo de universalaj homrajtaj normoj, multo restas farenda. Estis ripetaj kaj oftaj alvokoj por plifortigitaj iniciatoj de Unuiĝintaj Nacioj por plibonigi la agnoskon kaj protektadon de minoritataj homaj rajtoj, pro la malboniĝantaj kondiĉoj rilate al homaj rajtoj spertataj de multaj minoritataj grupoj tutmonde. Subtenante tiajn klopodojn, ekzemple la Projekton de Tutmonda Konvencio pri la Rajtoj de Minoritatoj, ni krome emfazas, ke lingvaj homaj rajtoj ankaŭ postulas la enkondukon, en ĉiu jurisdikcio, de inkluzivaj, egalecaj lingvaj politikoj, kiuj devus esti regule kontrolataj kaj taksataj.

Ĝisdataj komentarioj kaj rekomendoj por plifortigi la efektivigon de lingvaj homaj rajtoj estis prezentitaj kaj diskutitaj de diversaj internaciaj fakuloj, inkluzive de akademiuloj kaj reprezentantoj de la civila socio, en la 9-a Nitobe-Simpozio, organizita de CED en la Universitato de Torino, Italio, 28-29 julio 2023. Videoresumo de la simpozio estas havebla ĉi tie.

La 10-an de decembro, 2023

3 Artikolo de Michele Gazzola en The Guardian

En la brita ĵurnalo *The Guardian* aperis artikolo «English still rules the world, but that's not necessarily OK. Is it time to curb its power?» de Michele Gazzola, en kiu li priparolas la rolon de la angla kaj aliaj lingvoj en la hodiaŭa mondo. Li precipe fokusiĝas sur la maljusteco de la mondlingva situacio.

IV PERSONOJ

1 Erich-Dieter Krause (1935 – 2023)

Atingis nin la malĝojiga mesaĝo, ke la konata germana leksikografo prof-ro Erich-Dieter Krause mortis je la 18-a de oktobro 2023. Kiel specialisto pri la indonezia lingvo (Bahasa Indonesia) li laboris ĝis 2000 en la Orientazia Instituto de la Universitato Leipzig (Germanio). Li doktoriĝis en 1974 pri la temo «Fremdaj influoj al la leksiko de la indonezia kun speciala fokuso pri angloamerikaj influoj», kaj habilitiĝis en 1992. Krause publikigis lernolibrojn kaj vortarojn pri la indonezia lingvo.

Tamen li estas pli konata, precipe en germanlingvaj landoj, kiel leksikografiisto pri Esperanto. Lia unua vortaro Esperanto-Germana aperis en 1967 (190 paĝoj) kaj en 1971 aperis lia poŝvortaro Germana-Esperanto (279 paĝoj). Ekde tiu tempo li kontinue plivastigis sian leksikan kolektaĵon por publikigi pli grandajn dulingvajn Esperanto-vortarojn en entute kvar eldonejoj. Ĉe Mondial (New York) aperis lia duvoluma vortaro *Vollständiges Wörterbuch Esperanto-Deutsch* (Plena Vortaro Esperanto-Germana) (1512 paĝoj) en 2018 kaj, en tiu ĉi jaro, nur malmultaj monatoj antaŭ lia morto tie estis publikigita lia trivoluma verko *Vollständiges Wörterbuch Deutsch-Esperanto* (Plena Vortaro Germana-Esperanto) (2511 paĝoj). Tiuj du vortaroj ne nur enhavas unuopajn kapvortojn kaj kunmetaĵojn, sed multegajn ekzemplofrazojn, terminojn (precipe el medicino, zoologio kaj botaniko) kun klarigoj kaj parolturnojn. Ili estas samtempe ĝenerallingvaj vortaroj, fakvortaroj kaj frazeologiaj kaj enciklopediaj vortaroj.

Erich-Dieter Krause estis longjara membro de la Akademio de Esperanto kaj de la Redakta Komitato de la fakrevuo *Esperantologio / Esperanto Studies*. Li aktivis en la germana «Gesellschaft für Interlinguistik (GIL)» (Societo pri Interlingvistiko) prelegante kaj publikigante pri leksikografiaj temoj. Pri lia vivo kaj speciale pri liaj publikigaĵoj pli detale informas artikolo, kiu aperis okaze de lia 80-jariĝo en *Informilo por Interlingvistoj* (2015: 1-2).

La esperantistaro ŝuldas al Erich-Dieter Krause grandan dankon. Verŝajne ne estas germanlingva Esperanto-parolanto, kiu ne iam konsultis liajn vortarojn. Ili estas kaj estos valoraj por praktika uzo en la komunumo kaj aldone pro siaj ampleksoj kaj altkvalitoj ankaŭ helpas plialtigi la reputacion de Esperanto ekstere.

Sabine Fiedler

2 Lisa McEntee-Atalianis iĝis plenrajta profesoro

Lisa McEntee-Atalianis, recenzo-redaktoro de LPLP kaj proksima kunlaboranto kun Humphrey Tonkin en la novjorkaj simpozioj pri lingvo kaj UN, lastatempe fariĝis plena profesoro ĉe Birkbeck, Universitato de Londono.

V BIBLIOGRAFIAĴOJ

1 Disertacioj kaj diplomlaboraĵoj

2 Fakrevuaj artikoloj

Dzienis, Paweł (2022). «Esperanto jako język czynności prawnych», pola. En: *Kwartalnik Prawa Międzynarodowego* **2022 1**: 77–105. ISSN: 2720-5460. Angla versio, *Esperanto as a language of legal acts*, troviĝas ĉi tie..

«Aliĝilo» kaj «kotizo», du Esperantaj vortoj ofte uzataj kiam oni finas kontraktojn en la organizado de Esperanto-aranĝoj, estas nomataj en ĉi tiu artikolo kiel simboloj por la analizo de la uzo de Esperanto en civila juro. La konsideroj ĉirkaŭ la koncepto de la lingva formo de jura ago estas efektivigitaj sur du niveloj. La unua, pri juraj transakcioj inter esperantistoj en la Esperanto-movado laŭ akceptebleco kaj jura graveco. La dua, en universalaj civilaj juraj transakcioj kun speciala emfazo al internacia komerco, per la prismo de la akceptebleco, graveco kaj areoj de Esperanta apliko.
La aŭtoro analizas la ĝis-nunajn signalajn deklarojn de la pola civila doktrino pri la jura signifo de uzado de Esperanto kaj profundigas esplorojn en ĉi tiu areo. Tiurilate analiziĝas leĝaj agoj ĝenerale, la limoj rezultantaj de la apliko de la pola lingvo-leĝo kaj tiuj juraj agoj, kiuj postulas specialan formon, kiel testamentoj kaj kambioj, laŭ la akceptebleco esprimi volon en Esperanto. Gravan rolon ludas ankaŭ la lokigo de la subjekto en la kunteksto de la jenaj principoj: libereco de kontrakto kaj libereco de formo de juraj agoj kaj egaleco de partioj al juraj rilatoj de la civila jura tipo. La proceduraj konsekvencoj de la uzo de Esperanto en la sfero de substantiva juro estas ankaŭ montritaj. La kazo de la praktika apliko de Esperanto en juro, estas konsiderata, krom taksi multajn ekzemplojn. Ĝi resumas la avantaĝojn kaj riskojn kaj ankaŭ leĝdonajn proponojn.

3 Libroj

Fiedler, Sabine kaj Cyril Robert Brosch (2022b). *Esperanto – Lingua franca and language community*, angla. Studies in world language problems 10. Amsterdam: John Benjamins. ISBN: 9789027211477. DOI: doi.org/10.1075/wlp.10.

Esperanto – lingvafrankao kaj lingvokomunumo

Tiu ĉi libro traktas fascinan temon – konstruitan lingvon, kiu evoluis de projekto al plene funkcianta lingvo uzata de iuj parolantoj eĉ ĉiutage. Surbaze de ampleksaj esploroj la unuan fojon la libro ebligas profundan enrigardon al la uzado de Esperanto en granda nombro de komunikaj terenoj. Ĝi studas lingvoalternadon (t.n. code-switching), la uzon de frazeologiaĵoj kaj metaforoj fare de parolantoj, la teknikojn, kiujn ili aplikas por plibonigi komprenon, kiel ekzemple metakomunikadon kaj riparstrategiojn same kiel ilian preferon de humuro. La

esploroj ankaŭ kontribuas al komparo inter la komunikado en Esperanto kaj tiu en la lingvo, kiu nuntempe dominas kiel ilo de internacia komunikado – la angla – kaj ĝi donas respondon al la demand, kia estu komunikado helpe de lingvafrankao.

4 LIBROĈAPITROJ

ARAY, Başak (2024). «Metaphysics, tolerance, and language planning: Carnap on international auxiliary languages», en: *Interpreting Carnap: Critical essays*. Redaktis Alan RICHARDSON kaj Adam Tamas TUBOLY. Cambridge: Cambridge University Press. Ĉapitro 11: 214–233. ISBN: 978-1-009-09820-5. DOI: doi.org/10.1017/9781009099080.

Metafiziko, toleremo kaj lingvoplanado: Carnap pri internaciaj helplingvoj

La ĉapitro diskutas kiel la filozofio de lingvo de Carnap influis lian sintenon al lingvoplanadaj problemoj. Carnap esperantiĝis en juna aĝo kaj daŭre interesiĝis pri internaciaj helplingvoj. En sia Intelekta Membiografio, li klare mencias la rilaton inter sia aktiveco en la konstruado de simbolaj sistemoj kiel logikisto kaj sia intereso pri lingvoplanado por internacia komunikado, sekvante Descartes, Leibniz kaj Peano. Laŭ Carnap, ambaŭ taskoj supozas kritikan kaj krean starpunkton pri lingvo. Lia polemiko kun Wittgenstein pri Esperanto montras du kontraŭajn vidpunktojn pri lingvo, unu kiel instrumento por plenumi diversajn taskojn kaj unu kiel vehiklo de tradicio kaj identeco. Carnap rifuzas la lastan pro lia principo de toleremo (kaj ĝia instrumentismo) kaj pro la logika empirisma atako al metafizikaj konceptoj kiel *Volksgeist*. Tiun logikan empirisman vidpunkton kunhavas ankaŭ aliaj lingvoplanistoj kiuj emfazas la instrumentan econ de la lingvo kaj subtenas la aktivan partoprenadon de parolantoj en ĝi pere de lingvoreformado aŭ lingvokonstruado. Ni konstatas ke la kontraŭmetafizika rifuzo de la romantika vidpunkto de lingvo sekvigas pli liberalan kaj fleksiblan sintenon al lingvoplanadaj problemoj. Krome, la internaciismo de logikaj empiristoj efike inklinis ilin al subteno de internaciaj helplingvoj.

5 REVU-NUMEROJ

5.1 *Jahrbuch der Gesellschaft für Interlinguistik*

Jahrbuch der Gesellschaft für Interlinguistik, 2023. ISBN: 978-3-96023-577-4.

5.1.1 Enhavo

- Cyril Robert Brosch & Sabine Fiedler: Einführung (Enkonduko)
- Věra Barandovská-Frank: Mögliche Szenarien for the future of Interlinguistics (Eblaj tendencoj por la estonteco de interlingvistiko)

  Interlingvistiko estis origine komprenata kiel scienco pri kreado de internaciaj helplingvoj. Ekde la unua difino de Jules Meysmans el la jaro 1911 oni konstante plilarĝigas ties esplorterenon, inkluzivante praktike ĉion, kio konektiĝas kun lingvo, ekzemple lingvopolitiko, lingvokomparado, lingvoplanado kaj lingvonormigo, multlingveco, piĝinoj kaj

kreoloj, ĉiuj iloj de internacia komunikado/interlingvoj, lingvokreado por plezuro ktp. En la tempo de ĝenerala tutmondiĝo, oni povus eĉ esplori la rolon de mondaj anglaj lingvoj. En mia kontribuaĵo, mi klopodos rezoni pri kvar el multaj eblaj tendencoj:

1. English only: kunfandiĝo de interlingvistiko kaj anglistiko
2. Interlinguistics as Paleolinguistics: esploro de interlingvistiko pro historiaj kialoj
3. Hollywood Interlinguistics: pristudi lingvojn konstruitajn por fikciaj mondoj k.s. («Gobbotendenco»)
4. Interlinguistics recycled: uzi malnovajn planlingvojn por artaj celoj

- Pierre Dieumegard & Chloé Izquierdo: Zur Bekanntheit konstruierter Sprachen in Frankreich – Ergebnisse einer Umfrage im Jahr 2022 (Konoj pri konstruitaj lingvoj en Francio – Rezultoj de enketo en 2022)

  La artikolo prezentas la rezultojn de enketo pri konscio pri artefaritaj lingvoj farita en printempo de 2022 (nombro de partoprenantoj: 600). Montriĝas, ke Esperanto estas la plej konata lingvo el inter tiuj, kiuj estis kreitaj por internacia komunikado, kaj multe pli konata ol Volapuko. El inter la lingvoj kreitaj por beletro aŭ kino/televido la elfa lingvo de Tolkien estas plej konata. Post ĝi sekvas la klingona kaj la navia. La artikolo analizas la rezultojn rilate aĝon, sekson kaj klerigon de la partoprenantoj kaj ankaŭ iliajn respondojn al la demando, ĉu ili lernus artefaritan lingvon aŭ volus, ke iliaj infanoj lernu tian. La indikoj pri idearoj ligitaj al difinita lingvo estas malpli precizaj rilate la lingvojn por internacia komunikado kiel Esperanto kaj Volapuko ol rilate la lingvojn faritajn por artaj celoj.

- Sabine Fiedler: Interlinguistik for future? – Einige Überlegungen zu Zielen und zur Zukunft der Interlinguistik (Interlingvistiko for future? – Kelkaj konsideroj pri la celoj kaj la estonteco de interlingvistiko)

  La ĉefa temo elektita por la GIL-kunveno 2022 speciale stimulas pli intense prilumi la nuntempon kaj estontecon de interlingvistiko. Tio ŝajnas konvena antaŭ ĉio pro tio, ĉar en la pasintaj jaroj observeblas forŝoviĝo de la intereso de interlingvistikaj esploroj al la direkto de lingvoj konstruitaj por fiktivaj mondoj (kiel la klingona, Dothraki k.t.p.). Publikigaĵoj el pasintaj jaroj traktas tiujn lingvojn kreitajn por artaj celoj kaj planlingvoj kiel Esperanto kune kaj pli malpli nediferencige. Ĉu do interlingvistiko estonte signifas okupiĝi precipe pri tiuj lingvoprojektoj, kiel oni legas de tempo al tempo? Ĉu studado de planlingvoj ne plu necesas? Tiu ĉi artikolo esprimas la opinion, ke interlingvistiko devas klarigi la diferencojn inter la du tipoj de konstruitaj lingvoj, precipe rilate al iliaj funkcioj, malgraŭ kelkaj similecoj inter ili. Necesas, ke interlingvistiko kaj esperantologio estu perceptataj kiel seriozaj fakoj kaj ke ili kontribuu pli multe al aliaj disciplinoj.

- Cornelia Mannewitz: Ortsnamen in der Ukraine (Ukrainaj loknomoj)

  Ĉi tiu artikolo donas superrigardon pri la regiona kaj lingva diverseco de ukrainaj loknomoj. Ĉar dum longa tempo la rusaj formoj de kelkaj tiaj nomoj estis pli konataj ol la ukrainaj, ankaŭ la diferencoj inter tiuj formoj estas priskribitaj; ili respegulas samtempe diferencojn inter tiuj du lingvoj. Fine estas diskuto pri la politikaj kialoj por iuj loknomoj kaj ties ŝanĝo kun la paso de la tempo.

- Klaus Schubert: Interlinguistik im 19. Jahrhundert – Die Société internationale de Linguistique und die Universalsprachen (Interlingvistiko en la 19-a jarcento – La Société internationale de Linguistique kaj la universalaj lingvoj)

  Meze de la 19-a jarcento la pariza Internacia Lingvistika Societo studis kaj prijuĝis universalajn lingvojn. Frue en sia laboro la Societo malakceptis por la funkcio de internacia lingvo historiajn kaj samtempajn etnajn lingvojn, eĉ simpligitajn, iom poste ankaŭ aposteriorajn planlingvojn. Ĝi do nur favoris apriorajn planlingvojn. La plej altan juĝon ricevis la universalaj lingvoj de Letellier kaj de Sotos Ochando. La Societo deklaris la lingvon de Sotos Ochando la plej bona ĝis tiam publikigita universala lingvo, sed ankaŭ por ĝi proponis multajn plibonigojn. Samtempe kaj samteme laboris la filozofo Renouvier, kiu prezentis teorion favoran al sistemo kun vortprovizo pruntita el etnaj lingvoj kun gramatiko skeme kreita. Li tiel skizis la aposterioran principon sen nomi ĝin tia. La Societo konis, sed ignoris lian teorion. La artikolo kaj prezentas la laboron de la Societo kaj analizas ĝin kun la celo trovi efikojn de tiu frua entrepreno, kiuj ankoraŭ nuntempe estas senteblaj. La plej evidenta efiko estas la enkonduko kaj disvastigo de la klasifiko de planlingvoj per la konceptoparo apriora–aposteriora. Krome videblas en la debatoj de la Societo la proksimeco inter ĉiuj formoj de konscia kaj intenca stirado de lingvo, do inter planlingvoj kaj ortografia reformo, universala fonetika alfabeto, stenografio, kriptografio kaj la lingvaĵoj nuntempe kreataj por aŭde aŭ vide handikapitaj homoj.

  Tiu ĉi artikolo ankaŭ ekzistas en esperanta versio – Schubert, Klaus (2023): *Interlingvistiko en la 19-a jarcento. La Internacia Lingvistika Societo kaj la universalaj lingvoj*

- Christian Siefkes: Lugamun – eine mit algorithmischer Unterstützung erstellte »Worldlang« (Lugamun – mondfonta planlingvo kreita kun algoritma subteno)

  Relative nova kaj malgranda kategorio de internaciaj helplingvoj estas la «mondfontaj planlingvoj», kies vortprovizo kaj gramatiko baziĝas ne nur sur la hindeŭropaj lingvoj, sed ankaŭ sur lingvoj el aliaj familioj. Sed ju pli diversaj la fontlingvoj, des pli malfacilas pravigi la decidojn uzi certajn vortojn, gramatikajn strukturojn ktp. Kial uzi certan varianton, se alia povus esti same bona aŭ pli bona? Lugamun estas nova mondfonta planlingvo, kiu uzas algoritmon por faciligi ĉi tiun problemon surbaze de liberaj interretaj informaroj, kiel la multalingva Vikivortaro. Por ĉiu vorto aldonota al la vortaro, la vortoj uzataj en la diversaj fontlingvoj estas aŭtomate konvertitaj al la ortografio kaj fonologio de Lugamun, kaj automate vicigitaj surbaze de pluraj kriterioj, kiel ilia simileco al la vortoj uzataj en aliaj lingvoj. Ĝenerale la plej bone vicigita kandidato estas aldonita al la lugamuna vortaro; alia kandidato povas esti elektita se preferinda, sed tiaj elektoj estas ĉiam skribe pravigitaj. Tiel eblas kompreni por ĉiu vorto la motivon je ĝia elekto. Simile sistema procezo ankaŭ estas uzata por la elekto de gramatikaj strukturoj.

- Sabine Fiedler: Buchvorstellung – Erich-Dieter Krause: *Vollständiges Wörterbuch Deutsch-Esperanto* (in drei Bänden (Libroprezentado – *Plena vortaro germana-esperanto* (tri volumoj) de Erich-Dieter Krause)

  Tiu ĉi kontribuo okupiĝas pri la tri-voluma vortaro germana-Esperanto de E.-D. Krause, kiu aperis en tiu ĉi jaro. Kun pli ol 250 000 unuoj ĝi estas la plej granda dulingva vortaro, kiu entute ekzistas por Esperanto. La kontribuo klopodas prezenti kaj pritaksi la verkon

laŭ kriterioj troveblaj en la faka literaturo.

- Goro Christoph Kimura: Buchvorstellung – *Ermunterung zum sparsameren Gebrauch des Englischen* (Libroprezentado – *Instigo por ŝpareme uzi la anglan*)

  La artikolo prezentas libron de la aŭtoro, kiu rekomendas ŝpareme uzi la anglan lingvon kiel internacian lingvon. La libro argumentas, ke liberiĝo de la dependiĝo de la angla estas ŝlosilo por pli taŭge alfronti internaciiĝon kaj tutmondiĝon, kaj proponas konkretajn alternativojn.

5.2 *Language Problems and Language Planning*

Language Problems and Language Planning, **47:1**, 2023. ISSN: 0272-2690. E-ISSN: 1569-9889.

5.2.1 Enhavo

- Taiwo Oloruntoba-Oju & Bert van Pinxteren: Issues in introducing indigenous languages in higher education in Africa: The example of Nigeria

  Problemoj de enkonduko de indiĝenaj lingvoj en superan edukadon en Afriko: La ekzemplo de Niĝerio

  Kiel la plej homplena afrika nacio, kun unu el la plej diversaj, kaj problemoplenaj, etnolingvaj profiloj en la mondo, Niĝerio liveras modelan kazon por studi la eventualan enkondukon de indiĝenaj lingvoj en liveron de (supera) edukado en iam koloniigitaj teritorioj. Ni argumentas, ke pli alta nivelo de frekventado de supera edukado fariĝos necesa por ke Niĝerio atingu siajn evoluigajn celojn. Ni sekve pridiskutas la limojn de tio kion oni povas atendi de la niĝeria eduka sistemo per uzo de la angla kiel instrumedio. Kiam oni trapasos tiujn limojn, la iompostioma enkonduko de limigita nombro de niĝeriaj lingvoj fariĝos neevitebla. Ni celas distingi inter lingvoj dezajnitaj (t.e. intelektigitaj) kaj lingvoj perceptitaj, laŭ inspiro de la terminologio de lingvoj 'Ausbau' kaj 'Abstand' uzata de Kloss. La artikolo mallonge resumas la komplikan lingvan konsiston de Niĝerio kaj skizas kelkajn principojn kiuj povus gvidi raciajn decidojn ĉi-terene, kiel ekzemple akirofacilecon kaj inkluzivigon. Fine ĝi sugestas kelkajn konkretajn paŝojn por ke la enkonduko de indiĝenaj lingvoj en superan edukadon en Niĝerio fariĝu praktike ebla.

- Robert Neal Baxter : Interpreting as a part of language planning: A promising opportunity for Breton

  Interpretado kiel elemento de lingvoplanado: promesplena okazo por la bretona

  La referaĵo komenciĝas per mallonga superrigardo de la kialoj malantaŭ la malfortiĝo de la bretona lingvo en la meza deknaŭa kaj komenca dudeka jarcentoj, por meti en kuntekston la daŭrantajn revivigajn klopodojn kiuj komenciĝis je serioza nivelo en la 1980aj jaroj. La diskuto poste transiras al teoria trarigardo de la literaturo pri la ŝlosila rolo, jam fake montrita, kiun tradukado ludas kadre de lingvoplanado por minoritataj lingvoj ene de la komplementaj kampoj de Polisistema Teorio kaj la Sociologio de Tradukado. Tiurilate ĝi argumentas, ke la rilata sed signife subesplorita kampo de interpretado ankaŭ povas

signife kontribui al lingvoplanado kaj lingvorevivigo per altigo de videblo kaj de simbola prestiĝo. Fine, la referaĵo prezentas la rezultojn de limigita sed informoplena superrigardo de la ĉefaj interpretistoj aktivaj ĉi-terene por ĵeti lumon sur ŝlosilajn aspektojn de la aktuala stato de la nove formiĝanta fenomeno de bretonlingva interpretado (inkluzive de profiloj de interpretistoj, kaj direkteco, laborformoj, senpaga kontraŭ pagata laboro, klientaro, ktp.) kaj ties implicoj, cele al pritakso de ĝia potenciala efiko je lingvoplanado kaj eblaj vojoj en la estontecon.

- Rama Manor & Adi Binhas: Teaching Hebrew as second language in Arab schools in Israel: Policy and identity politics

  Instrui la hebrean kiel duan lingvon en arabaj lernejoj en Israelo: Politikoj kaj identopolitiko

  Studentoj kiuj apartenas al la signife granda palestina-araba minoritato en Israelo – proksimume unu kvinono de la enloĝantaro – estas devigataj studi la hebrean kiel duan lingvon. La nuna studo analizas la politikon de instruado de la hebrea kiel dua lingvo, tion farante per enhavanalizo de politikaj dokumentoj, demandaroj kaj intervjuoj kun instruistoj. Ĝi celas eltrovi la signifon de studado de la majoritata lingvo flanke de la minoritato el la vidpunktoj de praktiko kaj de etnonacia identeco. La eltrovoj indikas, ke la nuna politiko celas antaŭenigi la akiron de la parolata hebrea cele al integriĝo en supera edukado kaj en la labormerkato, kaj ke internaciaj enhavoj estas pli evidentaj kiel partoj de kreskanta malfermiteco en la palestina socio en Israelo. Rilate identecon, kreskis la graveco de la hebrea en tiu socio, sed samtempe tio prezentis defiojn rilate la senton de aparteno al Israelo flanke de la minoritato kaj ties identigo kun la valoroj kiuj akompanas la akiradon de la lingvo. Resume, ni eltrovis interrilatojn inter tri identosferoj: la palestina etnonacia idento, la juda-israela idento renkontata pere de studado de la hebrea lingvo, kaj tutmonda idento reprezentata de edukaj kaj dungiĝaj okazoj kaj valoroj.

- Kadija Bouyzourn, Rachel Macreadie, Shuxia Zhou, Reine Meylaerts & Anthony Pym: Translation policies in times of a pandemic: An intercity comparison

  Tradukaj politikoj dum periodo de pandemio: Interurba komparo

  En la jaroj 2020-22, multlingva privakcina komunikado fariĝis urĝa prioritato tutmonde, neprigante fidindan komunikadon en neoficialaj lingvoj. En Bruselo, Melburno kaj Ŝanhajo, signife malsamaj juraj kadroj kaj lingvaj politikoj frontis bezonon de kondutoŝanĝa komunikado en larĝa gamo de komunumoj kulture kaj lingve malsamaj. En ĉiuj tri ekzemploj, oni evoluigis praktikojn kiuj montris la limigojn de ekzistantaj tradukaj politikoj. Ĉi-artikole ni utiligas politikan analizadon por esplori la ecojn de tiuj defioj, por kompari la diversajn solvojn trovitajn en la tri urboj, kaj por proponi manieron por elkonstrui kaj alĝustigi politikojn por plibonigi tempopreman fidokonstruan komunikadon.

- Klaus Schubert: Review of "Věra Barandovská-Frank. 2020. *Interlingvistiko. Enkonduko en la sciencon pri planlingvoj*"

- Nasim Omidian Sijani: Review of "Thomas Ricento (Eds). 2021. *Refugees in Canada: On the loss of social and cultural capital*"

- Mariam Aboelezz: Review of "Chaoqun Lian. 2020. *Language, Ideology and Sociopolitical Change in the Arabic-speaking World: A study of the discourse of Arabic language academies*"

5.3 *Beletra Almanako*

Beletra Almanako, **47**, junio 2023. ISBN: 9781595694560. ISSN: 1937-3325.

5.3.1 Enhavo

- Prezento
  - Probal Daŝgupto
- Originala prozo
  - Marian Zdankowski: Mobilkoj
  - István Ertl: Sur la eĝo
  - Debra Hamel: La pasaĝero
- Originala poezio
  - Probal Daŝgupto: post la jubilo
  - Wael Almahdi: Du poemoj (La pano de Haĝĝi Salman; Formdonaj jaroj)
- Tradukita prozo
  - Dino Buzzati: Io kio komenciĝas per L (trad. Sara Spanò)
  - Manashi Dasgupta: Enigmo propra (trad. Probal Daŝgupto)
- Tradukita poezio
  - D. Iacobescu: Poemoj (Sonĝo nigra; Fantazia nokto; Vesperaj tonoj; trad. Ionel Oneţ)
- Teatro
  - István Ertl: Veronika kaj Paŭlo
- Artikoloj kaj eseoj
  - Geoffrey Sutton: Identeco
  - Sten Johansson: Rakonti romane
  - Wim Jansen: Sur neŭtrala lingva fundamento
  - Josip Pleadin: Đuro Sudeta: sopiro al la suno; *la poemojn tradukis: Josip Velebit*
- Recenzoj
  - Laurent Ramette: *Lando kiu vekiĝis. Rakontoj el Ukrainio* (de Kalle Kniivilä)
  - Sten Johansson: *Simeono* (de Mikaelo Bronŝtejn)

6 NOVAĴLETEROJ

6.1 *Global coalition for language rights (GCLR)*

Oktobro 2023

Kajero 33:2 (127)

I EVENTOJ

1 International Symposium on Language Ideologies and Attitudes (IDEOLING), 2024-10-18/19

1.1 *Loko*

Universitat de les Illes Balears, Palma de Mallorca

1.2 *Temo*

Lingvoideologioj kaj sintenoj kovrantaj diversajn temojn: lingva politiko kaj planado, potencrilatoj, kulturspecifaj reprezentoj ktp

1.3 *Priskribo*

Vidu la retpaĝojn.

2 46-a Esperantologia konferenco dum UK en Aruŝo

2.1 *Organizantoj*

La Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED), Mark Fettes kaj Bengt-Arne Wickström

2.2 *Loko*

Aruŝo kaj rete

2.3 *Temo*

Esperanto-rilataj esplorobjektoj en fakoj kiel lingvistiko, historio, sociologio, ekonomiko, juro, antropologio kaj literaturaj studoj, vidu priskribon malsupre.

2.4 *Priskribo*

La Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) alvokas ĉiujn fakulojn, esploristojn kaj aliajn kongresanojn al partopreno en la 46-a Esperantologia Konferenco. La aranĝo estos hibrida, ebligante partoprenon rete kaj ĉeeste, kadre de la 109-a Universala Kongreso de Esperanto en Aruŝo, Tanzanio (de la 3-a ĝis la 10-a de augusto 2024).

La programo enhavos plurajn dudek-minutajn referaĵojn elektitajn el inter la ricevitaj proponoj, kun fina rondatablo pri la nunaj esploraj defioj de esperantologio rilate al la traktitaj temoj. Ni bonvenigas proponojn de Esperanto-rilataj esplorobjektoj en fakoj kiel lingvistiko, historio, sociologio, ekonomiko, juro, antropologio kaj literaturaj studoj; ankaŭ interfakaj proponoj bonvenas. Aparte bonvenaj estos proponoj kiuj analizas aspektojn de Esperanto, esperantologio kaj interlingvistiko rilate al la kongresa temo: lingvo, homo kaj medio por pli bona mondo. Ankaŭ proponoj komparante Esperanton, la svahilan lingvon kaj aliajn afrikajn lingvafrankaojn – lingvistike, socie, antropologie ktp, ege bonvenus. Surbaze de la prezentoj, kelkaj aŭtoroj estos invititaj redakti siajn tekstojn por publikigo en la revuo Esperantologio / Esperanto Studies (Por detaloj pri tiu revuo, vidu ĝian retpaĝon).

Ni invitas ĉiujn fakulojn—aparte junulojn kaj unuafojajn partoprenantojn—sendi proponojn pri referaĵoj. La proponoj, enhavantaj inter 150 kaj 200 vortojn, devas esti sendataj al la retadreso ek46@interlingvistiko.net. Ni ankaŭ petas ke la proponantoj indiku, ĉu ili intencas prezenti ĉeeste aŭ virtuale. Kandidatoj por virtuala prezento bonvolu noti la tanzanian horzonon, UTC+3.

La limdato por proponoj estas la 30-a de aprilo 2024. Por kontroli la programon de antaŭaj konferencoj, vizitu la retejon de CED.

3 Fifth biannual REAL symposium: Human capital, languages, and new literacies; Theories, policies, and impacts, 2024-06-03/04

3.1 *Organizantoj*

REAL – Esplorgrupo «Lingvo, politikanalizo kaj ekonomiko» kunlabore kun Ulster University, Universitat de Barcelona kaj Universitat Rovira i Virgili

3.2 *Loko*

Universitat Rovira i Virgili, Tarragona

3.3 *Temo*

Homa kapitalo, lingvoj kaj novaj legopovoj: Teorioj, politiko kaj efiko

3.4 *Priskribo*

Vidu ĉi tie.

4 Colloque international sur les langues construites, I-Conlang, 2024-07-04/05

4.1 *Organizantoj*

Liĝera Lingvistika Laboratorio (LLL, UMR 7270, Université de Orléans, Université de Tours, BnF, CNRS)

4.2 *Loko*

Université de Orléans

4.3 *Temo*

La *Simpozio pri la konstruitaj lingvoj* enhavos tri sesiojn, kaj la unua sesio pritraktos ĉefe Esperanton

4.4 *Priskribo*

Vidu ĉi tie.

II UNIVERSITATA KAJ ESPLORA AGADO

1 KURSO «ENKONDUKO AL INTERLINGVISTIKO»

Ahmad Mamduhi de Universitato Espero de Kongo (Université Espoir du Congo), Demokratia Respubliko Kongo prezentas retan kurson dum la printempa semestro.

Por pliaj informoj skribu al: UEC-lingvo-fakultato@gmx.com

III KULTURO

1 Du artikoloj pri la interlingvo Bālaïbalan

En la retpaĝoj *Viki de UEA* troviĝas du artikoloj pri la planlingvo Bālaïbalan

2 Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko: Gazeteltondaĵoj 1898–1915: la kolekto Hachette en la interreto

Komence de la 1930-aj jaroj la Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko ricevis grandan kolekton de gazeteltondaĵoj. Temas pri pli ol 17 000 gazetartikoloj el la tempo inter 1898 kaj 1915 pri la temoj Esperanto kaj planlingvoj. Komence de la 20-a jarcento tiuj artikoloj estis sisteme kolektitaj de oficejo en Parizo por la eldonejo Hachette, kiu tiutempe eldonis multajn libroj en kaj pri Esperanto. La gazetartikoloj estas laŭlande kaj laŭtempe ordigitaj kaj ili troviĝas en 153 dosierujoj. Dum la pasintaj jaroj la bibliotekistoj de la Esperantomuzeo zorge purigis ĉiujn artikolojn kaj ekzakte listigis la titolojn (de la artikoloj, revuoj kaj rubrikoj), la nomojn (de la verkintoj kaj eldonlokoj) kaj la eldontagojn. Tiel kreiĝis 153 listoj enhavantaj pli ol 17 000 artikolojn. Poste la 153 dosieroj kun ĉiuj gazetartikoloj estis katalogitaj.



Ilustraĵo 2.1 Ekzemplo el la katalogo

En 2024 la servo eĉ pliboniĝis. Por ĉiuj 17 216 gazetartikoloj la bibliotekistoj kreis katalogeron, kiu havas rektan ligilon al la diĝita dokumento. Tio signifas, ke vi povas facile traserĉi la metadatumojn de la artikoloj kaj tiel pli rapide kaj ekzakte trovi viajn deziritajn informojn. Por la plej gravaj enhavoj estis aldonitaj ŝlosilvortoj por pli bonaj serĉebloj.

Se vi interesiĝas ekzemple pri Edmond Privat, Moresnet, la Spesmilo, «Le Concours Michelin» aŭ la 2-a UK en Ĝenevo en 1906, vi nur devas serĉi en la katalogo Trovanto laŭ Privat, Moresnet, Spesmilo, Michelin aŭ «2-a UK 1906», elekti sube je la dekstra flanko la filtrilon «Zeitungsausschnitt» kaj tiam vi ricevas la deziritajn katalogerojn kun ligiloj al la diĝitaj artikoloj.

Nun ni kreas apartan retpaĝon pri la kolekto Hachette, sur kiu vi povos traserĉi ne nur la metadatumojn, sed ankaŭ la plenajn tekstojn de la 17 216 gazetartikoloj. Tiu servo aperos ankoraŭ en printempo 2024 sur la retpaĝo de la ÖNB Labs.

Pro la katalogado kaj ciferecigo de la kolekto Hachette la katalogo Trovanto nun enhavas pli ol 85 000 katalogerojn de dokumentoj el la Kolekto por Planlingvoj kaj Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko. Pli ol 45 000 el tiuj katalogeroj eĉ havas rektan ligilon al la koncerna diĝita dokumento.

Bernhard Tuider

3 Le Monde publikigas artikolon pri konstruitaj lingvoj, 2024-01-26

La franca gazeto *Le Monde* publikigis artikolon de la ĵurnalistino Catherine Rollot pri novaj konstruitaj lingvoj sub la titolo «Klingon, sindarin, haut valyrien : et si vous appreniez une langue fictive ?»

4 Televida kanalo Arte publikigis videaĵon pri volapük kaj esperanto

